


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 291-292 (58-59) - KVINA EPOKO

APRILIO 1995



■ Esperanto-kongreso  
en Mataró

■ Lernejoj lernas  
esperanton

■ Kurseje, gazete kaj  
radie en Reus

■ Kataluna-esperanto-  
vortaro

■ Sukseca  
KEJ-diskut-kunveno

■ Polemika seminario

■ Kongresa temo:  
Salman Rushdie

■ Esperantista  
Nobel-premiito



**ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO**  **KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)

Apartat/Poŝtkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio.  
Tel. (93)716.36.33, (93)710.96.36 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 16a kaj 20a h.). FAX (93)727.13.51, Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro.  
Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1995: Individua Abonanta Membro 3.200 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.400 p-toj; Individua Dumviva Membro 64.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.400 p-toj. Juna Membro 2.500 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; Viceprezidanto: Lluís Amadans.; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Vicesekretario: Hektor Alos; Kasisto: Oscar Puig; Komitatoj: Miguel Ángel Altuna, Felip Artero, Paco Belmonte, Bartomeu Costa, Ĝirona Espero, Francesc Ibáñez, Joan Marimon.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Oscar Puig.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Feniòl Macip. Katalunlingva korektado: Eva Sunyer i Planes.  
La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO: Apartat 32 318, 08080 Barcelona.

FREKŬENCIES: Apartat 1 163, 08300 Mataró (Maresme).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

**Deziras korespondi...**

La jenaj korespond-  
petoj alvenis rekte al nia  
asocio:

- Pedro Pablo Ramírez  
Apartado Aéreo 3487  
Cartagena  
Kolombio

30-jarulo, kiu intere-  
siĝas pri vojaĝado, muzi-  
ko, legado kaj futbalo

- Victor Sirvent  
Apartado Postal 20495  
Caracas 1020  
Venezuelo

31-jara matematikisto  
deziranta korespondi kun  
esperantistoj en Katalunio  
pri lingvoj, lingvistiko, lite-  
raturu, sciencfikcio, histo-  
rio kaj filatelo

**Rimarkoj**

ĉ La liston ni aktualigos,  
kiam alvenos novaj pe-  
toj

ĉ Kiam iu membro de nia  
Asocio respondos kiun  
ajn peton, bonvolu in-  
formi nian sekretariejon  
por forigi la petanton el  
la listo

ĉ se membro de nia Aso-  
cio ricevas korespond-  
peton, kiun li/ŝi ne po-  
vas akcepti, bonvolu ĝin  
sendi al ni kaj tre volon-  
te ni enlistigos ĝin.

**P**ost kelka malfruo jen denove ĉe vi nova numero de nia bulteno. Vi povos legi pri pasintaj aranĝoj okazintaj en nia lando, inter kiuj elstaras la 4a KEJ-diskutkunveno, la jara asembleo kaj tre polemika kontraŭ-rasisma seminario. Kvankam ĉi tiu aranĝo verŝajne kontentigis neniun, nia asocio plu konsideras la temon esenca por hodiaŭa esperantismo kaj anoncas nacian kongreson en Mataró pri toleremo kaj kultura intermiksado.

Okazigo de aranĝoj pri ne rekte esperantaj temoj neniam montriĝis sukcesa en nia lando. Escepto kompreneble estas la elstaraj renkontiĝoj de KEJ, kies nombro da partoprenantoj eĉ superas la membraron. Tio povas liveri ŝlosilon por kompreni, kial KEJ-fakuloj organizas ĉi-jare la kongreson de KEA.

Nia asocio havas veran defion ĉe la kongresoj. Ekde la Barcelona jubileo, ĉiuj lamis, ĉefe enhance, kaj tion oni konstatis per la ĉiufoja malaltiĝo de la nombro de partoprenantoj. La kongreso en Mataró estas atente planita kaj enhavos riĉan programon. Elstarinde ĝi aparte orientiĝos al la neesperantistoj.

Fidon de la membraro pri la kvalito de niaj aranĝoj oni ne atingas per unu sola bato. Necesas, ke bonaj, memorindaj renkontiĝoj fariĝu la normo. Sed ni certas, ke per tiu 27a Kataluna Kongreso de Esperanto ni survojas al nia celo.

**Pardonpeto**

Ni pardonpetas pro la malfruo en la apero de *Kataluna Esperantisto*. La prokrastiĝon kaŭzis familiaj problemoj ĉe la ĉefredaktoro, kiuj feliĉe solviĝis. Ni esperas laŭregule aperigi ĉi-jare tri pliajn numerojn.

Kovrilo: Reinhard Selten, esperantista Nobel-premiito.



### Ordinara asembleo

La jara asembleo de KEA okazis la 27an de novembro en la Barcelona Unesko-Klubo. Partoprenis 22 membroj. Elstaris la regula parta renoviĝo de la estraro, dum kiu Josep Maria Milla, Joan Ramon Guiñón kaj vicprezidantino Maria Garcés senposteniĝis. Lluís Armadans akiris novan mandaton kaj estraraniĝis la KEJ-membroj Felip Artero, Paco Belmonte kaj Óscar Puig, kiu fariĝis kasisto. En posta komitat-kunsido Lluís Armadans estis elektita vicprezidanto. La asembleo aprobis novan 3200-pesetan jaran kotizon, laŭ la vivnivela plialtiĝo.

Plej longe la partoprenantoj diskutis kiel eldoni la faman kataluna-esperanto-vortaron monaĥece verkitan de Jordi Carbonell, por kiu oni buĝetis fortan investon.

### Esperanto televide

Esperanto rolis en la televid-programo pri lingvoj *Preguntas y respuestas* de TV 2 lundon la 16an de januaro inter la 10a kaj la 11a horoj matene. Intervenis nia ĝenerala sekretario Llibert Puig kaj la juna paro Pere Bernús kaj Reena Amerio. La du unuaj

### Kvindek infanoj lernas esperanton en Majoroko



KEA-anoj Elisabet Abella kaj Barbara Suau, instruistinoj en la lernejo Nicolau Calafat en Valldemosa (Majoroko), instruas esperanton al kvindek da gelernantoj. La centro aliĝis al reto de Unesko-lernejoj, kiuj -krom la kutimaj studobjektoj- instruas specifajn temojn rekomenditajn de Unesko. Ĝuste laŭ la programo *Fundapax*, diversaj lernejoj tra la mondo instruas esperanton dum siaj lernohoroj, kaj inter ili ĉi tiu majoroka.

havis okazon dufoje interveni dum la programo kaj ŝi unufoje, sed en esperanto kun posta traduko, kio vekis la intereson de kelkaj partoprenantoj. La eisendon oni disaŭdigis trasatelite al Sudameriko kaj Eŭropo.

### Multmedie en Reus

Niaj kolegoj ĉirkaŭ Reus ŝajne laboras laŭ la plej nuntempa teknologio: esperanton oni samtempe instruas en kursejo, gazeto kaj radio. Regulaj kursoj okazas en la prestiĝa Centre de Lectura, gviditaj de Josep Virgili. La monata gazeto *La lletra A* aperigas ekde januaro la po-dupaĝan kurson "Iniciació a l'esperanto", verkitan de la loka grupo. Sed tio kvazaŭ ne sufiĉis al nia impeta anaro: Luz Vázquez simpatie gvidas duon-horan ĉiusemajnan programon pri esperanto ĉe la loka radio-stacio *Punt 6 Ràdio*. La elsendo estas mikso de lingvo-lectionoj, esperantaj novaĵoj (prizorgitaj de Joan Marimon) kaj interesaj opinioj de la dojeno de la kataluna esperantismo, reŭsano Salvador Gumà.

### 27a Kataluna Kongreso de Esperanto

De la 12a ĝis la 15a de oktobro ĉi-jara okazos en Mataró (Maresme) nia nacia esperanto-kongreso. La temo estos "*De la komprensió a la tolerància; de la diversitat cultural al mestissatge/De kompreniĝo al toleremo; de kultura diverseco al intermiksado*". La loka kongresa komitato (Gemma Armadans, Xavier Rodon kaj Josep Maria Milla), kiu i.a. prizorgas la kongresan temon, antaŭvidas la partoprenon de afrikaj asocioj, kiuj fortas en la regiono. Gerrit Berveling, redaktoro de la vigla literatura revuo *Fonto*, jam akceptis ĉeesti nian kongreson. Li estas invitita prelegi, krom pri beletro, ankaŭ pri ekumenismo kaj religia interkompreno. Aldone la kongreso festos la 100-jariĝon de kino per la filmo *Memmortigo*, senvoĉa kataluna filmo antaŭmilita, kies titolo estas originale esperant-lingva.



En la programo foje kunlaboras ankaŭ lernantoj en Centre de Lectura kaj esperantistoj el Tarragona.

### Regule ĵurnale

Ekestas normale, ke en la gazetoj de Reus kaj Tarragona aperas priesperantaj novaĵoj: *Nou Diari* eldonis la 3an de oktobro prezentan artikolon kaj interesan intervjuon kun nia veterana samasocio Salvador Gumà, entute en du plenaj paĝoj. La 20an samonate, la sama ĵurnalo publikigis noton kun akompana foto pri la prelego de Kabók István en Centre de Lectura de Reus. *Diari de Tarragona* informis la 27an de decembro, ke Calafell povus fariĝi sidejo de esperanto-centro, laŭ iom ŝoka aserto de la loka esperantisto Ramon Carceller, kaj intervjuis la 24an de januaro en unu paĝo la aktivegan Luz Vázquez, el Reus. Denove *Nou Diari* la 19an de marto prezentis la agadon de

la Taragonaj esperantistoj; la noton akompanas foto, sur kiu videblas la KEA-anoj Joan Marimon, Andrea Ivnik, Josep Maria Serrano kaj Josep Virgili. Aliflanke la monata anarkiisma monata revuo *La Iletra A*, jam plurfoje publikigis priesperantajn legant-leterojn kaj regule aperigas kurson, kiun pretigas niaj Reŭsaj kolegoj. Same, *Info-Ateneu*, eldonita de Ateneu Libertari de Reus, informas pri la esperanto-kursoj okazantaj en la urbo.

### Ĉu esperanto-vortaro ĉe Gran Enciclopèdia Catalana?

Llibert Puig, KEA-sekretario, Òscar Puig, kasisto, kaj Jordi Carbonell, respondeculo pri vortaroj, dufoje intervjuiĝis ĉe Gran Enciclopèdia Catalana rilate al la eldono de esperanto-vortaro.

Dum tri jaroj, Jordi Carbonell prilaboris vortaron el la kataluna al esperanto kun ĉ. 12 000 kap-

vortoj, kiu nuntempe pretas por revizio. Nia asocio delonge komprenis, ke fariĝi eldonejo ne estas celtaŭga nek profitdona, kaj ke la eldonado de grandeta vortaro superas ĝiajn ekonomiajn kapablojn. Tial ĝi kontaktis la ĉefan tiufakan eldonejon en nia lando, Gran Enciclopèdia Catalana, por proponi publikigon. Ni rimarku, ke aperigo de tia verko ĉe nemovada entrepreno havas kiel avantaĝojn, ke nia malriĉa asocio ne zorgos pri financado kaj, eĉ pli grave, profesia eldonejo posedas vastan distribu-reton, kiu pli facile diskonigos kaj vendos la verkojn. Tiel ĝi povis entrepreni la eldonon de "raraj" vortaroj, kiel la kataluna-hungara kaj la ĵusa kataluna-sveda aŭ de la impona duvolume dika kataluna-portugala kaj portugala-kataluna (kunaŭtorita de la esperantisto Manuel de Seabra).

Nuntempe Gran Enciclopèdia Catalana studas nian proponon, kiun ĝi kredeble akceptos. Sedo estas, ke ĝi postulas du-direktan

### Nova vortaro kataluna-esperanta kaj esperanta-kataluna

Ĝus aperis ĉe Enciclopèdia Catalana kataluna versio de la fama bildvortaro Duden: 21 768 objektoj montritaj en 384 bildoj, kiujn kompletigas 27 500-termina alfabeto indiko.

Kiel tio rilatas al kataluna-esperanta vortaro? Nu, ĉar jam en 1988 estis eldonita esperanta versio de tiu tre rekomendinda verko: la *Esperanta Bildvortaro* de akademiano Rüdiger Eichholz. Danke al tio, posedantoj de ambaŭ vortaregoj povas facile trovi ekvivalentojn al la terminoj registritaj en ili.

Ĉu ĉio perfektas? Bone, estas tubero en la afero: la esperanta versio deiras el la dua germana eldono de 1958. Tial ĝi havas "nur" 368 bildojn kaj iom malpli da terminoj ol la pli moderna kataluna. Sed pli grave: el ili 154 estas la samaj en ambaŭ eldonoj, 56 estas plejparte identaj kaj 174 estas nove desegnitaj. Tio foje malhelpas trovi tradukon de unu lingvo al la alia.

Ja kompreneble estas aliaj problemoj: ne serĉu verbojn aŭ frazeologion en tiaj vortaroj (kaj preskaŭ certe vi ne trovos ankaŭ adjektivojn aŭ adverbojn): la verko registras nur desegneblajn terminojn. Aliflanke, la interesitoj devos aĉeti ne unu, sed du vortarojn, kio ja fariĝas multekosta (des pli, ke la falado de peseto konstante karigas la prezojn ĉe UEA). Solvo al tio estas la jam ekzistantaj dulingvaj Duden-vortaroj, sed bedaŭrinde ili ankoraŭ mankas kaj en esperanto kaj en la kataluna.

- Dictionari Visual Duden, Enciclopèdia Catalana, Dictionaris Complementaris 3, Barcelona, desembre 1994.
- Eichholz, Rüdiger, Esperanta Bildvortaro, Esperanto Press, Bailieboro, 2a eldono, 1989.

haif



vortaron, kio ankoraŭ malrapidiĝos ĝian aperon (eble ĝis 1998 aŭ 1999). Nia Asocio tamen preferas tiun solvon al propra eldono.

### "Catalunya Cristiana" pri esperanto

La semajna katolika gazeto *Catalunya Cristiana* aperigas en sia eldono de la 29a de novembro artikolon de Manuel Casanoves i Casals, prezidinto de KEA, pri la morto de Albino Ciccanti, kare alnomita "pastro Esperanto" kaj "pastro Aviostop". La esperantlingva revuo *Espero Katolika* dediĉis ok paĝojn al la forpasinta simpatia franciskano.

### Klasika Zamenhof-festo en Sabadell

La ĉi-jara Festa de la Ronda (nomo, kiun alprenas en Sabadell la Zamenhof-tago, pro la grava Ronda Zamenhof) eksperimente okazis en la apuda Plaça Marcet, pro tio, ke la pligraviĝo de la Zamenhof-bulvardo malhelpas la tie-

an organizadon de surstrata festo. Ĝi konsistis en la klasika ĉokolado, informa budo, libroservo kaj komuna tagmanĝo en restoracio.

### KEA por malarmado

KEA, KEJ kaj Centro de Esperanto Sabadell subskribis manifeston "por la travideblo en la armila komerco", iniciatitan de Amnestio Internacia, Greenpeace kaj Kuracistoj Sen Limoj. Nia Asocio regule subtenas ĉiujn manifestojn porpacajn kaj favorajn al la plena uzado de la kataluna lingvo en nia lando, kiujn iniciatas elstaraj kaj fi-  
dindaj organizaĵoj.

### Kontakto reabonita

Denove ĉiuj KEA-membroj super 30 jaroj ricevos ĉi-jare la revuon *Kontakto*. En la pasinta asembleo, la partoprenantoj neformale pridiskutis la temon kaj montriĝis vasta interkonsento kolektive reaboni tiun viglan revuon por la dua sinsekva jaro. Pro financa neeblo, la KEJ-membroj ne

ĝin aŭtomate ricevos, sed ili povas ĝin aboni je tre favora prezo.

### KEA UEA-kotizperanto

Laŭ nova strukturo, UEA ne plu havos nur po unu oficiala kotizperanto por ŝtato, sed se konvene pli. Tiu sistemo, jam ofta ĉe aliaj movadaj revuoj kaj asocioj, certe faciligos aliĝadon al UEA. KEA, kiu jam delonge peris por siaj membroj la pagon de abonoj kaj membrokotizoj, estis jam akceptita kiel peranto kaj ekricevos makleraĵojn pro sia laboro.

### Kataluna peranto de "Esperantista Vegetarano"

Xavier Margais i Basi, organizinto de la pasinta Kataluna Kongreso de Esperanto, transprenis la peradon de la revuo *Esperantista Vegetarano*. Interesitoj bonvolu lin kontakti ĉe la ĉi-suba adreso:

- Xavier Margais i Basi  
Orient, 60  
07110 Bunyola (Mallorca)

### Tradicia diskut-kunveno

Ĉu vi iam trovis aramean tekston skribitan per skandinavaj runoj, kaj ĉu vi povus eĉ ĝin legi kaj kompreni? Jen tamen parto de la kvizo proponita de Jomo Milla dum la 4a KEJ-diskutkunveno, okazinta inter la pasintaj 29a de oktobro kaj 1a de novembro en Sant Celoni (Vallès Oriental).

Ĉar evidentiĝis, ke KEJ-anoj finfine ĉiam parolas pri la samaj temoj, oni akceptis dediĉi tutan seminarion al la ŝatata ĉevaleto de la plimulto: lingvoj. Ferriòl Macip prezentis, en du neniel rilataj sesioj, sonĝo-lingvon kaj la okcitanan; Carles Vela, proponon pri transskribo de arabaj vortoj en es-

peranton; Hektor Alos prelegis pri morto de lingvoj; Mateu Vich, pri la kataluna en Majorko; Antonio Valén, pri la hispana en Sudameriko; António Martins, pri mitoj kaj realoj de la portugala tra kvin kontinentoj; Josep Maria Milla, pri la evoluo de alfabetoj.

Aparte riĉa montriĝis la nefaka programo: kunlaboraj ludoj, ekskurso al belega aŭtuna Montseny, kvizo, klasik-muzika koncerto, alia ĵaza, kaŝtanfesto (kun Centro de Esperanto Sabadell), danco...

Dum la renkontiĝo KEJ festis sian 15-jariĝon. Fakte, tuj antaŭ la

aranĝo la organizantoj ekdubis pri la aŭtentikeco de la jubileo: neniu dokumento atestas pri la fondiĝo de KEJ. Tamen, Óscar Puig, transvestita al Sherlock Holmes, malkovris, ke KEJn oni fondis en septembro aŭ oktobro 1979, kiel li rakontis en brila parolado (kiu espreble iam estos surpaperigita).

Kvankam la aranĝo eble ne estis tiel sukcesa kiel la pasintjara (iom malkreskis la nombro de partoprenantoj, ĉefe el ekster Katalunio, kaj lamis la lingva nivelo en tro multaj prelegoj), KEJ denove pruvis, ke ĝi estas vigla organizanto de memorindaj aranĝoj.



### Madjaro nin vizitis

Laŭ organizo de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) kaj KEA, s-ro István Kabók, instruisto pri historio, prelegis kvarurbe en Katalunio dum lia vojaĝo al pluraj okcident-eŭropaj landoj: la 19an de oktobro en Centre de Lectura de Reus, kie partoprenis ĉ. 30 homoj, la 21an en Ateneu d'Acció Cultural de Girona, kun la bedaŭrinda partopreno de nur ok homoj, la 25an en Barcelono kaj la 27an en Vilanova i la Geltrú. Nia asocio pretigis katalunan tradukon de la prelego, kiun oni surloke distribuis.

### Madjaro en Barcelono

István Kabók prelegis la 25an de oktobro en Klubo de Amikoj de Unesko de Barcelono pri la temo *Madjaroj en Vojvodino - historio nuno kaj perspektivoj*. Bedaŭrinde la tiutagaj ĵurnalaj agendoj estis sufiĉe plenaj kaj la anonco de la Esperanto-Fako "Miquel Vilagran" aperis kun la rimarko, ke temis pri esperantlingva prelego, sen mencio pri samtempa interpretado kaj disdono de tradukita teksto, eble por manko de spaco. Pozitive rezultis tamen reago de s-ro Pedro Brachfeld, prezidanto de la katalun-hungara societo, kiu celis kontakti s-ron Kabók, ĉar oni prezentis la verkiston Piter Pázmány en serio *Clàssics del Cristianisme* en Fundació Enciclopèdia Catalana. Negativa rezulto tamen estis la ĉeesto de ne pli ol 12 gesamideanoj, kiuj tamen montriĝis vere interesitaj pri la temo kaj finigis la prelegon per amika kolokvo.

Lluís Armadans

### Centoj da esperanto-libroj enrubujigitaj

La valencia ĵurnalo *Levante* denunciis en sia eldono de la 27 de januaro, ke la urba magistrato forĵetis centojn da ekzempleroj de la libro *Kiel fidela bundo*, senpage distribuita dum la Universala Kongreso okazinta tiu-urbe en 1993. La aŭtoritatuloj pravigas sin per la eraroj aperintaj en la libro "kaŭzitaĵoj de maloftaj karakteroj" (la esperantaj supersignoj) kaj la fakto, ke "ĝi estis jam sendita al 62 landoj", per kio ĝi plenumis sian rolon. La gazeto, ĝenerale tre proksima al la du partioj regantaj en la urbo (*Partido Popular* kaj *Unión Valenciana*) tamen miras pri tio, ke oni bezonis jaron kaj duonon por malkovri tiujn erarojn.

*Kiel fidela bundo* estas banala teatraĵeto originale verkita en la t.n. "valencia lingvo" (originala titolo: "*Com un gos fidel*"), fuŝe esperantigita: oftas elementaj eraroj kiel akuzativ-mankoj kaj okulfrapaj nacilingvismoj. Tio ne malhelpis al la Landa Krongresa Komitato eldoni la libron en 3 000 ekzempleroj (enorma kvanto por libro, ĉar en esperanto ĝenerale libro aperas po kelkaj centoj) kaj ĝin disdoni inter la partoprenantoj de la aranĝo. Bedaŭrinde la brila traduko de la poemoj de la klasika valencia poeto Ausiàs March, ankaŭ eldonitaj por la kongreso, ne ĝuis la saman privilegion.

Joan Marimon/Hektor Alos

### Madjaro en Vilanova i la Geltrú

István Kabók prelegis en Centre Cívic de Sant Joan de Vilanova i la Geltrú la 27an de oktobro pri *Madjaroj en Vojvodino, historio nuno kaj perspektivoj*. Ĉeestis 10 homoj, la plejmulto el ili lernantoj el la unua kurso. La prelego estis tre interesa, bone strukturita kaj ege kleriga, sed iom longa kaj pezeta, ĉefe por la tradukanto. Je la fino estis multaj demandoj, ĉefe de la neesperantistoj. La bilanco estas tute pozitiva, ĉar tiuj prelegoj aŭ similaj aranĝoj vigligas la grupojn kaj propagandas la movadon.

[Noto pri la aranĝo aperis la 21an de oktobro en *Diari de Vilanova*.]

Joan Inglada

### Atendante la nigran sanktan reĝon

Dum la lasta semajnfino de novembro 1994 okazis en la Barcelona Unesko-klubejo kontraŭrasisma seminario por esperantistoj. La iniciaton de Kataluna Esperanto-Asocio akceptis du klerigantinoj de Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo kaj 17 seminarioj aliĝintoj. Psikologino Encarna Teruel Rodríguez kaj etnologino Elisabeth Schwarzer el Berlino gvidis la praktikumadon.

La memsperta seminario celis surfacigi internajn diskriminaciajn bildojn de la partoprenantoj kaj ebligi al ili praktiki novajn rolojn en interkulturaj rilatoj. Ĉefpartoj estis (mal)similaj perspektivoj, bildoj pri fremduloj kaj si mem (individua kaj grupa identeco), diskriminacio kaj apliko de novaj impulsoj por interkulturaj rilatoj en rollu-



doj. Manko de seminaria rezolucio kaŭziĝas de la memsperta kaj konfidenca karaktero de la aranĝo.

Mi skizu la disvolviĝon. La atendoj de la homoj vastis: iuj preferis ekscii rasismajn statistikojn kaj difinojn, aliaj volis okupiĝi pri la distingo inter bono kaj malbono en la vivo. Per enhavaj temproponoj de la partoprenantoj ni plenis la seminarian kadron de t.n. ekzercoj.

Propraj enlandaj spertoj montriĝis tre gravaj. La plej konata kaj amata nigrulo en Katalunio estas la nigra magia/sankta reĝo kiu kun du reĝaj kolegoj adoras Jesuon 12 tagojn post Kristnasko. La homoj duope memoris pri alioj (precipe "ciganoj") kaj plensesie pri bildoj de specifaj alikulturanoj. En individuaj memoroj multo esprimiĝis, sed ne tuj retrovis reflektan aliron al unuopuloj. En la rakonto de svisa verkisto Max Frisch la samkultura sed alireligia andora judo dum sia vivdaŭro estis inter la lokaj homoj sed ne apartenis al ili. Nur post lia morto aperis nova perspektivo kaj li fariĝis iu integra parto.

La plenumo de ekzercoj pri individua kaj grupa identeco vere diferencis. Grupa identeco montriĝis pacema en situacio de praktika defio. Cepereca percepto de individua identeco en kolektivo trovis kaj akcepton kaj rifuzon.

Multfaceta karaktero de identeco ankaŭ donis plurajn elektoeblecojn kiam ni enketis pri konkreta diskriminacio en pasinteco... Memorgrupoj kreiĝis surbaze de plej multaj sinanoncoj. La grupaj dinamikoj estis malsamaj. Nur unu grupo plene funkciis. En la aliaj grupoj iuforme manko de identiĝo montriĝis per foriro. La grupo traktis la ĉefintereson de plejmul-

taj partoprenantoj kaj prezentis ambaŭ flankojn de sperto de kultura kaj lingva subpremo.

En la fina tago ni ĉerpis el konfliktaj temoj por rolludoj. En la esperanta sfero ankaŭ rolludo novas. Ni celis unue elmontri realon kaj due alternativajn kondutojn. Jam realo ne simplis por rolludo laŭ tema ĉefintereso de la homoj.

Konklude ni konsideris diversajn eblecojn malpligrandigi rasismojn kaj pligrandigi interkulturan kompreniĝon. Opinioj variis: iuj pledis por statistikoj kaj personaj provokoj kaj aliaj pli inklinitaj al memspertaj "privataj konfesoj" kiuj malfermu la vojon al alternativa konduto en interkulturaj kontaktoj.

Certe venos novaj sanĉoj por rolludoj en la reala vivo. Tre verŝajne ankaŭ estonte aliĝos afrikaj esperantistoj al la kongresoj de Kataluna Esperanto-Asocio. Kiamaniere la afrikaj samideanoj alvenos kaj kion ili spertos?

*Elisabeth Schwarzer*

### **Nov-tipa aranĝo**

Danke al iniciato de KEA kaj Unesko-klubo, ni trafis la eblecon partopreni nov-tipan kontraŭrasisman seminarion.

For el la kutimaj spertecaj etnismaj prelegaroj, E. Schwarzer kaj E. Teruel propon-petis de ni pli ol simplan respondon al la demandoj pli kaj pli defiaj lanĉitaj de nuntempaj pridiskriminaciaj konfliktoj.

Laŭ sekvo de tritaga seminario ni havis ne nur la ŝancon proponi temaron aŭ starigi difinitajn diskut-punktojn, sed eĉ memak-

cepte kaj libere pritaksi niajn proprajn aŭ grupajn kliŝojn kaj kontrastigi niajn ag-stimulojn fronte al realaj aŭ fikciaj situacioj. Kiel kutime en ĉi-specaj seminarioj fikciajn ni labor-spertis pere de ŝajnegaj teknikaj rimedoj, kiuj verŝajne estas la nura maniero ensituaciigi iun difinitan konflikton, eĉ se pale: do, aktorado, fraz-ludoj duopaj, elekto-ludoj aŭ engrupigoj konsistigis la seminarion. Kelkaj ludoj, ĉefe elektaj, montriĝis iom lamaj aŭ speciale neengaĝigaj, sed aktorado kaj engrupigoj efike plenumis siajn celojn. Speciale diskutdona estis la dimanĉa pridiskriminacia aktorado (virinoj, lingvominoritatoj) aŭ la konkluda diskut-rondo.

Entute mi taksus interesa oftigon de ĉi seminarioj ĉe niaj rondoj kondiĉe, ke organizantoj kaj partoprenantoj estu kiel eble plej funde kaj precize informataj de la trajtoj de samstilaj seminarioj, ĉar abundis miskomprenaj situacioj kaŭzita verŝajne de maldisponeblema (ne eca!) sinteno de kelkaj partoprenantoj antaŭ la noveco aŭ "ne-normaleco" de ĉi kontraŭrasisma propono; ĉi tute respektinda sinteno povintus, tamen, ekstreme malmultiĝi aŭ simple nuanciĝi kaze de ĉi menciita antaŭklarigo aŭ informa trejnigo.

Miaopinie eble mankis ĉe E. Schwarzer kaj E. Teruel iom plian entuziasmon aŭ engaĝigpovon kaj trois ekscesa kaj eĉ malrespektema pasio de kelkaj partoprenintoj defende de sia propra kliŝaro foje disrompanta la normale atendindan dialogeman etoson dum ĉi seminario.

Flanke de ĉi aferoj kaj fine, mi diru, ke la sperto utilis por nove kaj memkonscie alrigardi la diskriminacian fenomenon.

*Xavier Rodon*



## Pri la kontraŭrasisma seminario

Krom la fakta kontraŭrasisma agado, kiu klopodas bremsi la leĝan kaj faktan rasismon, oni povas diferencigi du ĉefajn direktojn de la kleriga kontraŭrasismo: la teorian klerigon, kiu celas analizi la kialojn de la ekapero kaj disvolviĝo de rasismo kaj proponi kontraŭmezurojn; kaj la memanalizan, t.e. la klopodado eltrovi ĉe ni mem la rasismajn ŝablonojn, antaŭjuĝojn kaj emojn, kiuj kuŝas kaŝitaj en nia subkonscio.

Memkompreneble por ĉiu partopreninto, la kontraŭrasisma seminario apartenis al tiuj, kiuj celas helpi la memanalizon per psikologiaj ekzercoj devenantaj el grupa psikoterapio. Tiu provo estus povinta fariĝi (kaj meritis fariĝi) grava kaj utila afero. Tamen ĝi malsukcesis, eble oni rajtas paroli pri fiasko. Kial?

Laŭ mia kompreno pro miskompreno flanke de la partoprenintoj pri la celo kaj pri la uzotaj rimedoj de la seminario, pro la naiveco de la ekzercoj proponitaj de la gvidantinoj kaj pro la netaŭgeco de la seminari-aranĝo por vekti aŭtentikajn sentojn.

### Miskompreno pri la celoj

Kutime mi komprenas pri *seminario* teorian seminarion, tamen ni partoprenis en stranga afero, kies celon ni komprenis nur tro malfrue, kiam tio ligiĝis kun la malkovro de la naivaj rimedoj: antaŭe nur gapo, poste elreviĝo kaj malengaĝo.

### Naiveco de la ekzercoj

Pri la takso de la ekzercoj mi nur povas paroli pri mi mem, ĉar mi tute ne konas la sentojn de la

aliaj partoprenintoj. Ĉe mi vekigis neniu sento, mi eltrovis nenion, krom iom da tedo kaj iometo da suspekto, ke iu verŝajne mokas nin.

Laŭ mia kompreno oni forgesis gravajn faktojn: unue, ke jam antaŭ multaj jaroj mi konscias pri la plej krudaj ŝablonoj, kiuj subkuŝas "mia" blanka, burĝa, kataluna, maskla penso, sekve la klopodo montri la senrajtecon de miaj bildoj pri usonanoj aŭ poloj nur povas tedi min; due, ke esprimio kiel "*mi fieras esti kataluno*" kaj "*mi fieras esti hispano*" povas efiki tre malmulte ĉe mi pro sia ĉiutageco: nia popolo havas nenian terure psikotraŭman historian sperton, kiel ekzemple germanoj dum la Tria Regno aŭ usonanoj en Viet-Namo, kiu malpermesas nin esti fieraj, ĉar katalunoj neniam faris ion grandan -nek bonan nek malbonan-; la dua esprimio povas nur vekti ŝercemon ĉe kataluna esperantisto proksima al sennaciismo, kiu solene, kvankam trudita, ĵuris defendi la hispanan flagon "*ĝis la lasta guto el sia sango*" kaj tamen pluviavas; trie, ke antaŭ sencenjaj elektoj oni ne montras siajn plej kaŝitajn sekretojn, sed la respondon al la mensa demando "*kiel mi ŝajnos malpli stulta*". Resume: mi kredas, ke oni forgesis la ecojn de la partoprenintoj, kiam oni planis la seminarion.

### Netaŭgeco de la aranĝo

Mi kredas ankaŭ, ke la seminario mem maltrafis provoki la sentojn de la partoprenantoj. La plimulto de la seminario konsistis en -laŭ mia kompreno- sencenjaj elektoj enketecaj faritaj, kiuj nur tedis la partoprenantojn. Tamen ĉe la lasta kunsido oni ekzercis teatrece. Mi tute ne scias, ĉu la propono pri teatraĵoj kuŝis en la projekto aŭ ĉu ĝi estis heroa rimedo savi alfundiĝantajn ŝipon (ĝi

temis pri ina diskriminacio, ne pri rasisma problemo), tamen ĝi estis la propono pli proksima al sperto. Bedaŭrinde ĝi estis nur teatraĵo, t.e. la aktoroj ludis antaŭkonsentitan kaj pretigitan rolon, kaj la aliaj reagis nur kiel publiko. Verŝajne ekzercoj konsistantaj en nepraj kaj senpretaj reagoj al kutimaj situacioj -kun partner(in)o, kiu intence pliakrigu la situacion- povus aperiĝi spontanajn sentojn, sur kiuj eblus bazi meditadon aŭ aran priparoladon. Anstataŭ tio la aktoroj ludis rolon, kiun ili konis, sed eble sentis ĝin nepropra, sekve la afero estis bedaŭrinde ne "*kion oni spertis?*", sed "*kiel aŭ kion lerte oni ludis?*".

Same la devojiĝaj ekzercoj pri ni mem kiel diskriminacintoj perdas sian sencon por kritiktaŭgaj homoj. Ekzemple: "*kiu sentas sin diskriminaciata, ĉar estas senlaborulo?*", "*kion oni devas fari por ne diskriminacii senlaborulojn?*" estas entute sensencaĵoj: oni pure kaj nure devas malaperigi senlaboron, ne klopodi subprivilegian situacion eternigante ĝin. Same pri la deveno el malriĉa familio, la ina diskriminacio kaj edzeco ktp.

Finfine mi volas agnoski mian nescion pri la psikologia fako kaj ke mi neniam partoprenis alian ekzercan aŭ memanalizan seminarion. Sekve oni devas akcepti tiun ĉi kritikon kiel analizan reagon al la ekzercaro proponita dum la kontraŭrasisma seminario.

Jurgo Alcàcer



# Salman Rushdie:

## Plureculo kontraŭ enfermitoj

Marjorie Boulton

**Salman Rushdie, verkisto por tiu minoritato, kiu ĝuas kompleksajn fikciojn miksoĝenrajn, ne nur distrajn sed beletrajn, iĝis fama inter milionoj kaj aperis, ofte misprezentita, en plej trivialaj ĵurnaloj, pro neordinara cirkonstanco: ŝtatestro publike mortkondamnis lin. Vulgarigo atingis tian nivelon, ke kiam britaj soldatoj pafis misilojn kontraŭ Irako, kaj laŭ soldata kutimo surskribis ironiajn salutojn, iu ornamis misilon per "Kun amo de Salman Rushdie". Kiu estas tiu verkisto kaj kia estas lia libro pli fama ol legita, *La Satanaj Versoj*? Kompleksa persono; libro tre leginda.**


Ahmed Salman Rushdie naskiĝis la 19an de junio 1947, en Bombajo, du monatojn antaŭ la sendependiĝo de Hindio, en familio formale islama, apenaŭ praktikanta. Li estis lernanto unue en la Katedrala Lernejo en Bombajo; sed kiam li estis dek-trijara, la gepatroj sendis lin al Anglio, por studi en la prestiĝa privata pensiona lernejo en Rugby. Li iris, entuziasma por Anglio kaj ĝiaj sportoj; sed la sentema knabo spertis ne nur normalajn hejmsopirojn aŭ kruelecon de lernejoj, sed rasismajn insultojn kaj mistraktojn. Lia prema tiama malfeliĉado certe jam influis liajn pensojn. Poste li studadis en la universitato de Kembriĝo, kaj magistrigis en 1968.

Dum mallonga tempo li provis aktoran karieron, iom laboris en la televida industrio en Bombajo, sed, post rasismaj kruelaĵoj de anglaj knaboj, li renkontis antaŭjuĝojn de hindoj, kiuj pro lia pala haŭto mokis lin kiel "anglon". Tamen, dum tiu periodo, li multe

observis pri televido kaj la vasta hinda filmindustrio, kies ĉefsidejo estas Bombajo. Li revenis al Anglio kaj eklaboris en la granda reklamada industrio, profesio kredeble iom cinikiga. Multaj britoj, kiuj ne konas liajn librojn, nekonscie konas kelkajn verketojn liajn, ĉar li elpensis kelkajn tre sukcesajn sloganojn, ekzemple por krem-kukoj, "Peketaj sed plaĉaj"; pri certa bobelplena ĉokolado, "Delektabobleco!". Tie li lernis pri diversaj hipokritaĵoj kaj trompoj, pri la graveco de fantazio en la ĉiutaga vivo, pri dubindeco de informoj...

Li nun estas brita civitano kun brita pasporto, kaj normale loĝas en Britio. En 1976 li edziĝis kun Clarissa Luard, de kiu li havas unu filon, Zafar, kiun li tre amas; li ek-edziĝis en 1987, restas tamen en amika rilato. Lia dua edzino, ekde 1988, estas mem verkistino, usonanino Marianne Wiggins.

Liaj ĉefaj distraĵoj estas legado, filmoj kaj ŝako. En liaj verkoj ofte troviĝas rimedoj iom similaj al



Kovrilpaĝo de *Satanaj Versoj*

filmaj metodoj: li rapide ŝanĝas la vidpunkton, li multe uzas simbolojn kaj etajn signifajn indikojn; estas memevidente, ke lia imago funkcias grandparte vide, t.e. bilde. Estas same memevidente, ke li multe legis, kaj ne nur facilajn librojn; liaj verkoj estas plenaj de aludoj, citaĵetoj (certe pli ol mi rekonis) kaj oni povas spuri diversajn literaturajn influojn tra lia verkaro. Inter favorataj libroj liaj estas tri, kies influojn oni facile rekonas en liaj romanoj: *Moby Dick* de Herman Melville; *Ulysses* de James Joyce; *Tristan Shandy* de Laurence Sterne; tri literature gravaj romanoj, kiuj ne havas la kutimajn rakontajn strukturojn. Influis lin eble eĉ Lewis Carroll, al kies



### Problemoj de Aziaj enmigrintoj en Britio tre koncernis lin, kaj dum sep jaroj li serioze laboradis en unu el la Londonaj Komitatoj por Komunaj Rilatoj, t.e. por plibonigi rilatojn inter diversaj etnaj grupoj kaj preventi diskriminacion.

*Alica en Mirlando* kaj *Alica tra la Spegulo* li aludas en *La Satanaj Versoj*. Sed plaĉas al li ankaŭ romanoj pli realismaj, ekz. de Charles Dickens, Jane Austen, la fratinoj Brontë. Li ankaŭ multe legis en la literaturo de Azio: inter aliaj, *La Mil kaj Unu Noktoj* araban kaj aliajn fabelarojn; li tre bone konas la legendojn kaj folklorojn islamajn kaj hinduajn; li multe legas poezion.

Scipovante plurajn lingvojn - aziajn kaj eŭropajn - Rushdie videble tre ĝuas vortojn - frandas multajn diversgustajn idiomojn, stilojn, lingvajn etosojn; ofte enkondukas alilingvaj vortojn en siajn anglajn verkojn. Lia vortostoko estas vasta kaj iom neordinara. Plaĉas al li vortludoj, anagramoj, vortaj kuriozaĵoj; ekzemple, en *La Satanaj Versoj* rolas balbutanto, kies balbutaj silaboj ofte formas vortetojn komike komentajn. Plaĉas al li amuzaj hiperboloj - "dika kvazaŭ kvindek melonoj"; policanoj kun lampoj "enŝaltis sep sunojn" - slangaĵoj, abundaj sinonimoj, karakterizaj parolturnoj de etnaj grupoj, la neatendita atenta vorto, la rara aŭ ekzotika vorto. Li estas stila ĵonglisto aŭ akrobato, kies entuziasmo facile infektas leganton; sed leganto devas mem esti iom klera por ĝui tian virtuozan ludadon.

Rushdie tamen ne estas nur brila fantaziisto kaj pasia stila prestidigisto. Liaj verkoj spegulas kelkajn internajn vundojn, konfliktojn, proprajn ambiguecojn, sed li montras pli larĝan intereson pri politiko kaj sociaj problemoj. (Ni

memoru, ke ĉe universitato li elektis studi ne literaturon, sed historion). Problemoj de Aziaj enmigrintoj en Britio tre koncernis lin, kaj dum sep jaroj li serioze laboradis en unu el la Londonaj Komitatoj por Komunaj Rilatoj, t.e. por plibonigi rilatojn inter diversaj etnaj grupoj kaj preventi diskriminacion. En intervjuo post la "mortkondamno" li emfazis siajn servojn al azianoj en Britio. Rilatajn temojn li foje tuŝis, eĉ draste, en siaj romanoj. Li aktivis ankaŭ en la grava kaj liberprotektita verkista societo Internacia P.E.N., en komitato de la Brita Filma Instituto kaj en la konsilantaro de la Instituto por Aktualaj Artoj.

### Malfacila romanisto

Lia unua romano, *Grimus*, aperis en 1975. Leginte ĝin iom tro rapide, en biblioteko, mi konstatas, ke mi apenaŭ rajtas taksu ĝin. Mi trovis ĝin malfacila. Rushdie mem menciis en artikolo, ke lia modelo estis poemo, *Konferenco de la Birdoj*, de Farid ud-din Attar, sufista poeto persa (ĉ. 1180 - ĉ. 1220), grava en la literaturo de Islamo. Tie, birdoj (homaj animoj) serĉas la Simurgon, mitan birdon simbolantan Dion. (*Grimus* estas anagramo de *Simurg*). La persa poemo estas plejparte nekonata en Britio, kaj mi ne scias, ĝis kioma grado *Grimus* eĉas ĝin. La romano estas malbana, riĉa, kompleksa fantazio; ne estas facile, vere sekvi la rakonton, sed enestas mirinda invento de karakteroj kaj situacioj, kaj multaj brilaj priskriboj. Mi ricevis impreson de pluraj tavoloj de sig-

nifo, kalejdoskopaj moviĝoj de multkoloraj desegnoj. Ekzilita rusino diras ion, kio eble parte prezentas opinion aŭtoran: "Ne plaĉas al mi rakontoj tro striktaj. Rakontoj devas simili al la vivo, esti ion disfibrigitaj rande, plenaj de ne finkudritaj fadenoj, kaj vivoj apudmetitaj akcidente, ne laŭ ia grandioza desegno. La plej granda parto de la vivo estas sensignifa; do certe estas distordo de la vivo, rakonti rakontojn signifajn je ĉiu detalo, ĉu ne? Kaj rakonto, distordanta la vivon, estas ne malpli ol krima, ĉar ĝi sekve povas distordi vian vivkomprenon".

La ĉefa heroo de *Grimus* estas indiano el izolita tribo, kiu renkontis diversajn personojn, adaptante sin tiel plaĉeme ke "li estis ne pli ol konsenta kapjeso, oĉea kliniĝo". Eble rilate al problemoj de enmigrintoj? Inter aliaj aventuroj, li atingas insulon, kie loĝas homoj senmortaj. Personoj perdas kaj retrovas unu la alian; halucinoj kaj koŝmaroj alternas kun realaĵoj; rolas magiaj fluido kaj normalaj emocioj; ofte okazas filozofiaj aŭ sciencaj diskutoj, eble ne prenenantaj tute serioze; mi ne komprenas la tutan romanon kiel alegorion: Rushdie verŝajne ĝuas la kreadon de stranga, nova mondo kun propraj naturleĝoj kaj enmiksado de niaj kutimaj pasioj, aspiroj, eraroj. Valoras, eble, noti, ke en la hejmo de *Grimus* oni vidas super la pordo: "TIO, KIO ESTAS KOMPLETA, ESTAS ANKAŭ MORTA".

Li vere famiĝis en Britio per sia dua romano, *Infanoj de Noktomezo*, kiu en 1981 gajnis tri premiojn (Usonan kaj britajn). Ĝi estas multe pli longa ol *Grimus*, kaj havas pli da realismaj partoj.

La *Infanoj de Noktomezo* estas tiuj, kiuj naskiĝis ĝuste je tiu noktomezo, la 15an de aŭgusto





Salman Rushdie

1947, kiam Hindio iĝis sendependa. La heroo, Saleem Sinai, estas unu el tiuj. Tiuj infanoj havas specialajn kapablojn, inter ili specon de telepatio, kiu permesas al Saleem komuniki kun ĉiuj aliaj noktomezanoj tra Hindio.

Kredeble Rushdie tie ironias pri la grandaj espero kaj aspiroj pri libera Hindio. La romano implicas multajn kritikojn pri la nova Hindio, kaj tre malplaĉis al la tiama ŝtatestro, s-ino Gandhi. Ni ofte trovas en la romano la temon de Okcidentaj kutimoj, tradicioj, teknologio kaj sekularismo kontraŭ islamaj tradicioj, ankaŭ hin-

duaĵ kontraŭ islamaj. Rushdie emis iom moki ĉiujn, kaj indikas la multecon de sektoj, partioj, opinioj. Li skizas la kruelajn sektismajn konfliktojn kaj perfortojn antaŭ la disiĝo de Pakistano disde Hindio - tragikajn; kaj multajn brile vivajn detalojn de kulturaj kolizioj kaj konfuzoj - komikajn. Post unu mirinda paĝo, kie la heroo listigas diversajn influojn, kiuj kreis lin tia, kia li estas, li finas: "Por kompreni unu vivon, vi devas engluti la mondon". Tion li ripetas pli malfrue. Li ankaŭ emfazas necertecojn, miksecon de la vivo; kiel bebo, li preskaŭ mortas pro tifoido, kaj savis lin eteta dozo de

kobra veneno; lia "frua kontakto kun la ambigueco de serpentoj" povus esti pli ĝenerala metaforo por la etoso de la libro kaj verŝajne la menso de Rushdie. Telepatiaj travivaĵoj helpas Saleem kompreni pri politiko: "Iam mi estis grandproprietanto en Uttar Pradeŝ, kies ventro ondis super la piĝamo-kordo dum mi ordonis al miaj servutuloj flamigi niaĵ superfluan grenon; alimomente mi estis malsatmortanta en Orissa, kie, kiel kutime, nutraĵoj mankis". Li ankaŭ montras absurdecon de milita propagando, ekstremaj religiaj kultoj, aspektoj de la tiama registaro, la fama virsteriliga progra-



"Oni trudas 'fundamentismon' al la popolo, desupre.  
Aŭtokrataj reĝimoj trovas, ke estas utile alpreni la retorikon  
de la fido, ĉar homoj respektas tiun lingvaĵon kaj hezitas  
oponi ĝin."

mo... Do, *Infanoj de Noktomezo* estas, parte, sufiĉe akra kaj foje ŝoka politika satiro; sed ĝi estas multe pli.

La fabelo mem estas tre komplika, tre miksas grandskalajn kaj ekstremajn fantaziojn kun realismaj, ofte kortuŝaj kaj amuzaj, bildoj pri familio mem tre ambigua kaj miksa; Rushdie samtempe portretas, ofte kun brila elekto de simptomaj detaloj, modernan Hindion, kaj la perpleksojn de homoj en plureca kulturo; kaj kreas propran mitologion komikan aŭ ŝokan, groteskan aŭ lirikan; epizodo sekvas epizodon, intrigoj interplektiĝas, kaj ĉio okazas en densa teksaĵo de eksterordinare riĉa, multnuanca, varia, idiosinkrazia lingvaĵo vere unika al tiu verkisto.

Salman Rushdie estas do esence ia *plureculo*, pri lingvaĵoj, religio, politiko, psikologio, kutimoj; li konstante konscias kaj insistas pri la varieco, miksitĉo, kontraŭdiroj, konfuzoj de la homa vivo. Vortaro kaj stilo montras paralelan plurecon.

### Aŭguraj frazoj

En 1983 sekvis romano malpli longa, *Honto*, kiu bizare miksas humuran fantazion kun groteska horror-romano kaj iom da politika satiro; kiel la antaŭa verko, ĝi miksas aŭtoran mitologion kun realaj detaloj el la historio kaj politiko de Pakistano, kaj el la travivaĵoj de Aziaj enmigrintoj en Britio. Denove mi citos ŝlosilan frazon:

"Mi mem sukcesas teni samtempe grandajn nombrojn de tute ne harmoniigeblaj opinioj, sen ajna malfacilaĵo. Mi ne kredas, ke aliaj estas malpli mult-talentaj".

Li klarigas, ke lia *bonto*, angle *shame*, estas la iom pli larĝa kaj grava urdua *ĝaram*, emocio malpermesita en la familia hejmo en la romano. "*Ĝaram* kovras ne nur honton, sed 'ĝeniĝon', humiliĝon, decosenton, pudoron, timidon, senton, ke oni ne havas destinitan lokon en la mondo, kaj aliajn dialektojn de emocio, por kiuj la angla ne havas ekvivalentojn".

*Honto* estas iom malpli vertiĝige kalejdoskopa ol la antaŭaj romanoj: estas iom pli da rekta rakontado kaj eble kelkaj karakteroj estas pli home realaj. Se mi ne misinterpretis post nur du rapidaj relegoj, estas parte historio pri la monstriĝo de la "hontobesto"; kiel humiliĝo ofte kreas malicon kaj detruemon. Ni scias, ke multloke registaroj, burokratoj aŭ pli amatoraj kaj intence kruelaj rasistaj najbaroj ofte malestimas kaj humiligas Aziajn (aŭ Afrikajn) enmigrintojn, pri kies psikologio Rushdie diras: "estas la sorto de migrantoj, esti senvestigitaj de sia historio, stari nudaj meze de malestimantaj nekonatoj, sur kiuj ili vidas la riĉajn vestojn, la brokaĵojn de kontinueco kaj la brovojn de apartenado...". Aliloke, li klarigas, ke realisma romano pri Pakistano estus malpermesita, sed "Mi rakontas nur ian modernan fabelon, do en ordo! neniu devas malkvietiĝi, aŭ preni tre serioze ion, kion mi diras".

Sed, malfrue en la rakonto, li subite enmetas komenton verŝajne tute seriozan:

"La tielnomita islama 'fundamentismo' ne fontas, en Pakistano, de la popolo. Oni trudas ĝin al ili, desupre. Aŭtokrataj reĝimoj trovas, ke estas utile alpreni la retorikon de la fido, ĉar homoj respektas tiun lingvaĵon kaj hezitas oponi ĝin. Estas tiel, ke religio apogas diktatorojn; ĉirkaŭante ilin per vortoj potencaj, vortoj, kiujn la popolo ne volas vidi senkreditigitaj, senrajtigitaj, mokitaj. Sed validas la punkto pri ŝtopado-en-la-gorĝon. Finfine naŭzas nin, ni perdas fidon pri tiu fido - se ne kiel fido, almenaŭ kiel bazo por ŝtato".

Tio nun sonas iom ironie anticipipe!

### En Nikaragvo

Rushdie verkis du scenarojn por televiziaj filmoj, *La Pentristo kaj la Plago*, 1985, kaj *La Enigmo de Noktomezo*, 1988; pri ili mi ne havas scion. En 1986 la Sandinista Asocio de Kulturaj Laboristoj invitis lin al Nikaragvo, kie li pasigis semajnojn nur tri, sed plenegajn; rezultis lia nefikcia verko, *La Jaguara Rideto*, pri Nikaragvo. Tie, kvankam evidentiĝas, ke li celis plej precizajn kaj esprimivajn vortojn, ankoraŭ ĝuas sian lingvan virtuozecon, li montris, ke li povas forgesi ekstremajn fantaziojn kaj verki klare, relative simple, pri realaĵoj. Pri Nikaragvo li penis esti objektiva, ekvilibra. Li ĝenerale simpatiis kun la Sandinistoj, abomenis la Uson-subtenitajn "Kontraŭulojn"; konstatis, ke hindo pli ol okcidentano komprenas la sentojn de homoj en lando malavantaĝa; admiris la novan Nikaragvan konstitucion. Li klarigis, ke la subpremitaj Miskito-indianoj, kies malfeliĉo estas unu el la plej justaj riproĉoj kontraŭ la Sandinis-



toj, estis mem subpremantoj pli frue kaj preskaŭ neniigis la tribojn Rama kaj Somo; sed samtempe li konsentas, ke la mistraktado de la Miskitoj estis grava misfaro. Li prinotis mankojn, inflacion, opiniojn de oponentoj; rakontis kiel eble plej diversajn personojn. Sed tio, kio plej malplaĉis al li, estis la malpermeso de ĵurnalo *La Prensa* kaj la rigora cenzurado.

Tiurilate, li mencias, ke li iam vivis en Pakistano sub drasta dekstrema cenzuro, kaj komentas: "Tio, kio maltrankviligas min, estas, ke cenzuro estas tre alloga. Ĝi restas tiel multe pli facila ol la alternativo". Li insistas, do, ke, kvankam li simpatias kun la reĝimo en Nikaragvo, ĝi ne estas demokrata.

### La plej matura romano

Baldaŭ Salman Rushdie mem trovis sin en la mezo de konsternakra disputo pri la principo de aŭtorita penslibereco - kaj en neordinara persona danĝero. En septembro 1988 aperis lia plej matura romano, *La Satanaj Versoj*. En Britio, beletristoj atendis por la romano prosperon kaj prestiĝon; recenzis ĝin kiel brile originalan, inĝenieran fikcion; kaj kredeble ne tro ĝeniĝis, ke baldaŭ ne tre demokratizitaj registaroj en Hindio, Pakistano, Sud-Afriko kaj kelkaj malgrandaj arabaj landoj malpermesis ĝin. Britoj kutime malestimas ŝtatan cenzuron, kiu tuj suspektigas pri registaraj motivoj. *La Satanaj Versoj* ricevis grandan literaturan premion, marĝene maltrafis alian.

### La protestoj de islamanoj kontraŭ la libro, aŭ iom aberacia bildo de ĝi, stimulus rasismon inter krimemuloj fakte ne mem liberamaj. Blankhaŭtaj huliganoj trovis pretekstojn por mistrakti islamanojn, vandali iliajn moskeojn kaj butikojn.

Sed multaj islamanoj indignis, ricevinte raportojn pri supozitaj asertoj el la libro. En januaro, islamanoj en Bradford, unu el la britaj urboj, ekster Londono, kun la plej alta procento de Aziaj enmigrintoj, ceremonie bruligis ekzempleron de *La Satanaj Versoj*. Tiu naiva gesto de vundita minoritato sen protenco pensigis multajn britojn pri fifama vandalismo de potencaj tiranoj - la grandskala librobruligado en nazia Germanio. La Bradfordaj islamanoj estis tiel naivaj, ke riproĉitoj respondis, "Sed ni honeste *pagis* la libron!"

En Britio rasa diskriminacio, rasismaj persekutoj, perforto, instigoj al perforto, estas kontraŭleĝaj; sed tiaj krimoj tro ofte okazas, ofte ligitaj kun senproportie laŭtaj etaj faŝistecaj grupoj. Bedaŭrinde, la protestoj de islamanoj kontraŭ la libro, aŭ iom aberacia bildo de ĝi, stimulus rasismon inter krimemuloj fakte ne mem liberamaj, sed ankaŭ revekis tradiciajn antaŭjuĝojn kontraŭ Islamo inter homoj kutime toleremaj. Samtempe, britaj islamanoj mem, sentante sin sendefendaj kaj sian religion ofendita, iĝis pli agresemaj: fondis novan Islaman Partion por kampanji pri diversaj aferoj, organizis protestmarŝojn en pluraj urboj, eldonis flugfoliojn.

Mi menciis, ke en Britio aktivis jam du societoj de, plejparte, islamanoj, kies celo estis helpi interkomprenon inter islamanoj kaj aliaj: la Kalamo-fonduso, kaj la Islama Societo por Religia Toleremo, kies fondinto, d-ro Heŝam El-Esaŭi, tre klopodis por plibonigi la situacion. Sed fanatikismo pli interesas reporterajn...

Multaj protest-marŝoj estis dignaj kaj ordaj. Mi loĝas en Oksfordo, en neriĉa kvartalo kun multaj islamanoj, moskeo, *balal*-viandejoj, urduaj afiŝoj; la islamanoj kondutas kutime dece; ja ne estas ili, kiuj vomas, ebriaj, surstrate, aŭ molestas virinojn. Mi vidis ilian marŝon kontraŭ Rushdie, kaj, kvankam ĝi ŝokis mian penslibereman animon, ĝi estis disciplinita kaj sen ajna perforto. Simile multloke; sed ne ĉie. Tumulto en Islamabad mortigis ses personojn, vundis ĉirkaŭ cent; okazis gravaj tumultoj en Kaŝmiro; unu mortis tie; alia pro bombo en Karachi; 12 islamanoj estis mortpafitaj de policanoj en Bombajo; kaj kiam, en majo 1989, 25 000 islamanoj marŝis en Londono, dek ok policanoj estis vunditaj kaj diversaj perfortaĵoj okazis.

Mi konfesas, ke por mi unu el la plej belaj figuroj en tiu tumulto estis konata brita ateistino, 65-jara, Barbara Smoker, kiu antaŭ 25 000 koleraj islamanoj fiere tenis standardon proklamantan liberecon de opinioj! Oni kriadis kontraŭ ŝi, "Mortigu!" Ŝi staris. Eble eĉ pli kuraĝaj, tamen, estis reprezentantoj de nova virina protestgrupo, Virinoj Kontraŭ Fundamentalismo, plejparte azianinoj kaj

#### Katalunaj tradukoj

- Rushdie, Salman, *Els fills de la mitjanit*, Edicions Proa, A tot vent n.º 262, 2 vol., Barcelona, 1987
- Rushdie, Salman, *Els versos satànics*, Columna, Barcelona.



sinceraj islamaninoj, kiuj konscias pri la misuzo de religio - ankaŭ kristana fundamentismo - por subpremi virinojn. Tiun tagon ili kontraŭmarŝis por defendi Rushdie.

Dum 1989 pluraj librovendejoj, kiuj malkaŝe stokis la libron, damaĝis per incendioj aŭ bomboj; pluraj homoj estis vunditaj dum freŝa tumulto en Bradfordo. Finfine la diversaj organizoj - inter ili la Societo por Religia Toleremo, kiuj kune formas la Islaman Fronton por Agado, decidis haltigi grandskalajn manifestaciojn pro la perfortaĵoj kaj risko de rasistaj atakoj. Ekzistas islamanoj, kiuj serioze kredis, ke *La Satanaj Versoj*, ege individueca verko de krea intelekto, estas afero de "kontraŭislama konspiro de judoj, kristanoj kaj Eŭropaj registaroj"; dume, blankhaŭtaj huliganoj trovis pretekstojn por mistrakti islamanojn, vandali iliajn moskeojn kaj butikojn. Rushdie mem estis tre ŝokita, ĉar homoj mortis rezulte de lia libro; kaj estas eĉ tiuj, en Britio, kiuj nomis lin kulpa pri tiuj mortoj, tute maljuste. Li ĉiam insistis, ke li ne intencis blasfemi.

### La murdodekreto

La 14an de februaro 1989, la ajatolo en Irano proklamis *fatŭa'n*, religian dekreton, kiu mortkondamnis Rushdie pro insulto kontraŭ Islamo; kaj vokis ĉiujn islamanojn, mortigi lin. Almenaŭ laŭ mia limigita scio, tio estas senprecedenta en la moderna mondo, kvankam totalismaj atakoj kontraŭ verkistoj en propraj landoj estas oftaj. Ne nur Rushdie, sed la brita registaro kaj polico devis reagi serioze; la verkisto kaj lia ekzino devis forlasi sian hejmon kaj kaŝi sin. Ekde tiam ili devis ofte translokiĝi, konstante kun armitaj gardistoj; dum du jaroj Rushdie jam loĝis en pli ol sekdek do-

moj. Kaj troviĝis kelkaj politikistoj kaj ĵurnalistoj, kiuj damaĝis tiun prizorgadon de brita civitano en unikaj cirkonstancoj. Cirkonstancoj, kiuj mueladus la psikon de iu ajn: neniam viziti amikojn, kinejon, eĉ elekti ion en butikoj, promeni ie; sed aparte turmentaj por verkisto disigita de siaj kutimaj konsultlibroj, stimuloj, konsolaj konataĵoj - kaj Rushdie estas nature scivolema; kaj kiel hardi sin, kiam sentemo, akraj perceptoj, riĉaj emocioj, estas parto de la profesia ilaro mem? Minimumas mia scio kaj klaĉado aĉas, sed ŝajnas, ke post longa lojaleco dum tiu angorplena seria heĝirado, la edzino Marianne, mem verkistino, disiĝis de Salman; ĉu por ĉiam, mi ne certas.

Ne mankis solidarecaj gestoj. Amnestio Internacia protestis al la Irana registaro. La 2an de marto, Internacia Komitato por Defendi Salman Rushdie kaj liajn eldonistojn aperigis en multaj ĵurnaloj deklaron, ke ĉiuj subskribintoj sentas sin partoprenantoj en tiu eldono, "ĉu ni aprobas la enhavon de la libro, aŭ ne... Ni alvokas mondan opinion, subteni la rajton de ĉiuj homoj, esprimi siajn ideojn kaj kredojn kaj diskuti pri ili kun kritikantoj, sur bazo de reciproka toleremo, liberaj de cenzuro, timigo kaj perforto". Tiun deklaron subskribis pli ol mil verkistoj, inter ili: Chiŭna Acebe (Niĝerio), Saul Bellow (Usono), Joseph Brodsky (Sovetio), J. M. Coetzee (Sud-Afriko), Ŝusako Endo (Japanio), Carlos Fuentes (Meksikio), William Golding, Graham Greene, Iris Murdoch (Britio), Hanif Kureishi (Pakistano/Britio), Ved Mehta (Hindio/Britio), Alberto Moravia (Italio), Françoise Sagan (Francio) - nur specimenoj el brila listo internacia, sur kiu, eble, plej honorinde, aperas eĉ dek verkistoj el Irano. Laŭ nomoj kaj landoj, multaj el tiu listo kredeble estas is-

lamanoj aŭ vivas en islama medio. La brita Societo de Verkistoj subtenis la deklaron kaj en 1990 ripetis ties esencon; la angla filio de P.E.N. Internacia agis por subteni Rushdie. La fama Niĝeria verkisto Wole Soyinka verkis brile elokventan defendon de Rushdie kaj de aŭtoro libereco; prezidento Vaclav Havel de Ĉeĥoslovakio speciale penis influi la Iranan registaron; du belgaj islamanoj estis murditaj, ĉar ili faris deklaron kontraŭ la *fatŭa*. Laŭ unu demandesploro nur 28% de britaj islamanoj plene aprobas tiun dekreton; kaj, pli malfrue, 90% preferis pardonon.

Mi kutime preferas legi, por distri min, romanojn pli facilajn, kun pli rektaj kaj realismaj rakontoj; kaj mia pensia enspezo estas modesta laŭ britaj kriterioj; sed tuj post la *fatŭa* mi iris al mia kutima librovendejo, aĉetis *La Satanaj Versoj* kaj gratulis stabanon, ĉar la vendejo malkaŝe stokas ĝin. Espe- reble multaj aliaj, ne havante potencon aŭ influon, faris similajn gestetojn. (Kaj mi ĉiuokaze subtenas Amnestion Internacian, Societon de Verkistoj kaj P.E.N. Internacian).

Kiam mortis ajatolo Ĥomejni, multloke malfunebrita, en junio 1989, multaj esperis, ke novuloj nuligos la murdodekretan; sed la sekvantoj, Ali Ĥamenei kaj prezidento Haŝemi Rafsanĝani, deklaris, en la sama monato, ke la dekreto staras; laŭ ajatolo Ĥamenei, "eĉ se Rushdie pentos kaj iĝos la plej pia viro de sia epoko". Ĥamenei eĉ postulis, ke la brita registaro transdonu Rushdie al britaj islamanoj, kiuj plejparte insistas, ke ili en Britio obeas britajn leĝojn. Islamaj fakuloj atentigis, ke tiu murdokreto ne fontis el la Korano aŭ islama leĝaro, laŭ kiuj devas esti proceso, la akuzito rajtas prezenti sian defendon, kaj eĉ post kondamno, apostato havas tempon



Tuj post la "fatŭa" mi iris al mia kutima librovendejo, aĉetis  
"La Satanaj Versoj" kaj gratulis stabanon, ĉar la vendejo  
malkaŝe stokas ĝin.

pentu kaj pardonigi. (Laŭ la Korano, la anĝelo, kiu prinotas niajn bonfarojn, notas tuj, sed tiu, kiu prinotas niajn pekojn, atendas kelkajn horojn, ĉar eble ni pentos, do pardonigos. Mahometo mem plurfoje montris grandanimecon kaj pardonemon al oponentoj, eĉ blasfemantoj).

Dume - kiam okazis katastrofa tertremo en Irano - Rushdie kontribuis per 5 000 pundoj al fonduso por helpi viktimojn, dirante, "Ni devas pensi nur pri la homama afero, kiu superas ĉiujn aliajn diskutojn".

La Brita Komitato por Filmcenzuro, kiu malofte malpermesas filmon, sed precipe preskribas aĝolimon por spektantoj, por protekti infanojn, plene malpermesis eksterordinaran filmon, *Internaciaj Gerilanoj*, tri kaj duonhoran "epopeon", kreitan en Pakistano de Sajad Gul, kiu mem ne estas fanatikulo, sed volis plaĉi al ordinara nekleraj spektantoj kaj tiel profiti. Laŭ tiu filmo, iu fikcia Rushdie loĝas lukse en Filipinoj, kun centoj da gardistoj aspektantaj kiel israelaj soldatoj, meze de tutmonda juda konspiro! Li ege drinkas, multe blasfemas, kaj, kun judaj helpantoj, torturas kaj murdas islamajn heroojn, kiuj volas lin mortigi. Tiu Rushdie, neniel simila al la reala persono, mortas finfine per fulmofrapo de Alaho. Antaŭ tiu monstra kalumnio Rushdie denove kondukis grandanime: diris, ke li "ne deziras la dubindan protekton de cenzuro" kaj ne procesos kontraŭ la filmo; la Brita Komitato tiam donis permeson por spektantoj pli ol 18-jaraj.

### Kompleksa libro

Sed kia vere estas la libro?

Kredeble la granda plimulto de ĉiuj, kiuj uile postulis la santon de la aŭtoro, ne legis kaj ne kapablis legi *La Satanaj Versoj*; kaj multaj, kiuj legis aŭ, pli ofte, parte legis ĝin, miskomprenis ĝin. Iu kiu, kiel mi, dum jaroj instruis pri literaturo kaj korektis milojn da ekzamenpaperoj pri detale studitaj preskribitaj libroj, posedas unu scion pli certan ol sia ĝenerala supozaro pri la kosmo: ke homoj vere mirinde kapablas mislegi, miskompreni, mistaksi kaj misciti literaturan verkon.

Ankaŭ, multaj homoj ne havas fidindan koncepton pri fikcio. Ekstremkaze, virinoj skribas sincereajn amleterojn al personoj en televiziaj dramoserioj: homoj eĉ atakis surstrate aktor(in)ojn, kiuj en dramoserio prezentas malbonulon; multaj citas vortojn, kiujn fikciisto metas en la buŝon de fikcia persono, kiel opinion de la verkisto, aŭ kredas, ke aŭtoro aprobas, aŭ spertis ĉion, kio okazas en la libro. Estas pli malfacile, eĉ por relative inteligenta leganto, plene kompreni la esploran, hipotezan, veron serĉantan aspekton de fikcio.

Salman Rushdie verkis romanojn por limigita legantaro: por vere malnaivaj, riĉkulturaj kaj iom larĝmensaj intelektuloj, kies kulturo estas jam iom plureca, kiuj komprenas ironion, paradoksojn, mitofaradon, parabolojn; kiuj facile regas grandan vortostokon kaj ĝuas vortajn virtuozaĵojn. Mi, kiu profesie studadis literaturon dum

preskaŭ kvindek jaroj, estas nur margene inda legi liajn romanojn; ili estas, por mi, iom malfacilaj, postulas intensan atentadon. Sed ju pli mi studas liajn verkojn, des pli mi estimas lin. Mi suspektas, ke iuj cinike misformis kaj ekspluatigis malklerulojn, eble pro politikaj motivoj.

Jen la esenca historio. Gibreel Farishta, el islama familio, sukcesa hinda filmstelo, kies profesia nomo signifas "Gabrielo Anĝelo", aktoro precipe en tiuj hindaj filmoj nomitaj "teologiaj" - pri hinduaj legendoj - grandskala diboĉa amoranto, grave malsaniĝas, mistere resaniĝas, perdinte sian fidon. Defie, li eniras hotelan restoracion kaj manĝegas ĉiujn eblajn porkaĵojn; samtempe enamiĝas en Alleluia Cone, eminenta montgrimpantino. Ekde lia kontraŭislama gesto, li suferas "punon per sonĝoj".

La alia ĉefpersono, Saladin Chamcha, estas hindo, ankaŭ el islama familio, kiu, kiel Rushdie, vizitis anglan lernejon kaj universitaton, kaj, parte pro amara ribelo (ne senkaŭza) kontraŭ sia patro, iĝis aktoro en Britio, entuziasme anglecigis sin kaj edziĝis al anglino Pamela Lovelace; sed, vizitante Hindion, komencis amaferon kun hindino, Zeenat Vakil. Li komencas senti sin ŝirita de internaj konfliktoj inter hindaj kaj britaj etosoj.

Gibreel kaj Chamcha vojaĝas al Londono en la sama aviadilo, en kiu Chamcha renkontas absurdan sinjoron, reprezentantan la groteskan certecon kaj arogantecon de Usona kristana fundamentalismo. Teroristoj rabkaptas la aviadilon; Chamcha volas, vane, diri al teroristino: "ke rigideco povas ankaŭ esti monomanio, povas esti tiraneco, ankaŭ frakasiĝema, sed tio, kio estas fleksebla, povas esti ankaŭ humana, kaj sufiĉe for-



ta por daŭri". La aviadilo kraŝas. Karakterize, Rushdie miksas multajn kredeblajn observojn kaj eventojn kun la necesa fantazia miraklo: Gibreel kaj Chamcha kvazaŭ flugas, alteriĝas vivantaj; sed Gibreel akiris aŭreolon kaj ŝajnas identiĝi kun ĉefanĝelo Gabrielo; Chamcha akiras kornojn kaj kaprajn hufojn kaj ŝajnas identiĝi kun Satano. Sed regas ambiguesco. Gibreel, forlasinte sian fidon, disfalas psike, torturite de sonĝoj malkvietigaj; Chamcha per ruzoj verkas en li obsedan ĵaluzon; Gibreel finfine aĉetas la lastatagan eksterman trumpeton Azraeel kaj enflamigas pekantojn, aŭ halucinas tiele; mortigas sian amatinon kaj poste sin mem. Chamcha, post multaj aventuroj, humiliĝoj, misfaroj, revenas al sia mortanta patro en Hindio kaj al siaj radikoj.

La supraj frazoj detruas trosimpligas tre kompleksan historion, sed indikas du gravajn punktojn: *La Satanaj Versoj* rakontas pri du hindoj, kiuj konfuziĝas, suferas kaj misfaras, ĝuste ĉar ili tro enradikiĝis el siaj patrio, religio kaj tradicioj; kaj preskaŭ ĉio, kio ofendis islamajn legantojn - kaj nelegantojn aŭdintajn nur citaĵojn - troviĝas en sonĝoj de homo klare montrita kiel psike malsana. Alia faktoro en la malkoheriĝo de Gibreel estas kulposento pri la sinmortigo de amantino, kiu fantome turmentas lin kaj, laŭ li, faris la finan murdon. La romano implicas multajn homajn perpleksojn, ambiguecojn de la vivo, necertecon de niaj sentoj kaj motivoj, dubojn pri kio estas reala, kio fantazia, kio kaŭzas kion; paralele la malpli universalajn komplikojn de plurecaj kulturoj kaj kulturaj miksaĵoj. Ĉiuj tiuj gravaj konceptoj estas al ni dozitaj kun abundaj siropoj: sensacio, intrigo, humuro, satiro, groteskaj troigoj, brile vivaj bildoj, lingvaj akrobataĵoj, eĉ pecoj de

vera kortuŝo. Fantasmagorio prezentas multajn solidajn verojn.

Ekzemple, Changez, la patro de Chamcha, kondutas kontraŭ li tiel diktatore, humilige, mokeme, ke ni aplaŭdas lian ribelon kaj sopiron al fremda kulturo: "Kio ajn mi estas, kara patro, mi ŝuldas ĉion al vi." Samtempe diro de Changez, "Viro ne fidela al si mem, iĝas bestio du-krura", ne sensencas. Chamcha, spertinte rasismon en amata adoptita patrio, Anglio (reala problemo), dum li progrese metamorfoziĝis en kaprodiablon (fantazie) pli kaj pli lernas, ke nenio estas jes-aŭ-nea, ke neresponditaj demandoj restas, eĉ multobligas. Li pli kaj pli lernas pri enigmoj de amo, malamo, ĵaluzo, venĝo, pardono. (Kiam li reiĝas forme homa, estas pro lia portempa *malamo* kontraŭ Gibreel: nia malbono estas en niaj propraj psikoj, ne necesas ekstera diablo). Kiam Chamcha revenas al Hindio kaj al la patro mortanta pro kancero, Rushdie pritraktas ilin preskaŭ realisme, kaj komparte. Chamcha konstatas, "ke eĉ la nepardonebla peko, esti ies patro, povas ĉe la fino pardoniĝo." Kaj "eble malfeliĉo estas la kontinuaĵo, tra kio moviĝas la homa vivo, kaj ĝojo estas nur serio de brilpunktoj, de insuloj sur la rivero." (Do, ni ne tro atendu). Ĉu tio veras aŭ ne, Chamcha revenas al radikoj, patrio, Zeenat la hindino, sia propra plej ĝusta realeco.

### Kontraŭ religia rigideco

La 547-paĝa libro estas plena de epizodoj, amintrigoj, miniaturaj mitoj, psikologiaj kameoj kaj lerte elektitaj detaloj de kulturaj diferencoj, kolizioj kaj ankaŭ kunfandiĝoj. La ĉefaj ofendoj al islamanoj estas en la rakontoj pri Mahometo, partoj de la skizofreniaj sonĝoj de Gibreel. Oni akuzis pri insultoj ne faritaj, ekzemple ke Rushdie diras,

ke la edzinoj de la Profeto estis putinoj. Sed ne. Gibreel sonĝas pri bordelo, kie putinoj alprenas nomojn kaj rolojn de tiuj edzinoj kiel stimulan fantazion - tian, kian bordel-vizitantoj ofte deziras. Mahometo arestigas kaj ekzekutigas ilin. Rushdie priskribas la morton de Mahometo, uzante vortojn similajn al la tradiciaj: "Se iuj ĉi tie adoras la Mesaĝiston, ili funebru, ĉar Mahometo mortis; sed se iuj ĉi tie adoras Dion, ili ĝoju, ĉar Li certe vivas."

Miaj konoj pri Islamo estas etaj, kvankam pli grandaj ol tiuj de la plimulto de britoj; unu trorapida tralegado de la Korano, de biografio de Mahometo; loĝado inter multaj islamanoj; kelkaj islamaj konatoj, sed ne intimuloj... En la Korano mi trovis multajn belaĵojn, saĝaĵojn, justemajn regulojn; sed ŝokas min la multaj insistoj pri ekskluzive prava fido, kaj la prohiboj de liberaj interpretoj aŭ metaforaj kompreno. Inteligentaj kristanoj, ekster tiuj fundamentistaj sektoj, kiuj danĝere influas, ekzemple, en Usonaj politiko kaj lernejoj, tute kutimas nuntempe al diskutoj pri interpretado, al granda plureco de kompreno. Kristanoj alkiutimiĝis al studado de la Biblio rilata al arkeologio, internaj kontraŭdiroj, teksta kritiko, tradukaj problemoj, historia penso-evoluado, kompara religio kaj tradicioj mitologiaj, ktp. Nur la plej malkleraj kaj naivaj povas nun kredi, ke la multaj aŭtoroj de la Biblio estis kvazaŭ stenografiistoj de Dio, kvankam oni povas paroli pri inspiroj. Mi scias malmulton pri hebreaj sektoj, sed certe pluraj rabenoj (ekz. Lionel Blue, Julia Neuburger) verkis ankaŭ kun larĝaj interpretoj.

Mi ĵus aĉetis por amikino libron de karikaturoj, ŝercoj pri Biblio, eklezioj, preĝejoj kutimoj - verkitan de kristano, eldonitan ĉe



**Kredeble la granda plimulto de ĉiuj, kiuj ulule postulis la sangon de la aŭtoro, ne legis kaj ne kapablus legi "La Satanaj Versoj"; kaj multaj, kiuj legis aŭ, pli ofte, parte legis ĝin, miskomprenis ĝin.**

specife kristana eldonejo; oni kutime ne ŝercus pri io profunde sankta, ekz. krucumo kaj releviĝo de Jesuo, eŭkaristio, sed akceptas iom da ŝercado pri arkaikiĝintaj konceptoj pri paradizo, infero, Edeno, ktp.

Okcidentanoj ofte ŝercas, ekz. en karikaturoj, pri Islamo, sed preskaŭ nur pri unu detalo, kiu, bedaŭrinde, estas la sola, kiu ĝenerale eniris niajn mensojn: poligamio kaj haremo. (Estus interese demandi nin, kiel efikus Okcidente, se same impresus nin la islama insisto pri almozo...) Kun la duobla tradicio de scienceca interpretado kaj libera diskutado, plus permeso de ioma ŝercado, okcidentanoj malfacile komprenas la intenson de islamaj reagoj al la "blasfemoj" de Rushdie, precipe kiam temas pri sonĝoj de frenezulo aŭ nesukcesaj filmoj, kiujn li faris. Sed ni ankaŭ devas kompreni, ke, same kiel kristanoj, islamanoj ne troviĝas en nur unu sekto; apud fundamentistoj ekzistas multaj grupoj pli exploremaj, moderaj, toleremaj; multaj emfazas la kompaton kaj pardonemon de Alaho.

Ŝajnas al mi, eksterulo, ke Rushdie inteligente, pensige kaj subtile bildigas diversajn aspektojn de fido, inspiro, dubo kaj la respektindajn suferojn de religia pioniro, same kiel Chamcha kaj Gibreeĵ, li esploras miksitajn motivojn, la kirliĝadon kaj kalejdoskopcon, de bono kaj malbono en homoj pli ordinaraj. Baal, poeto, kiun Mahometo finfine ekzekutos, diras, "Laboro de poeto - nomi la

nenomeblan, fingromontri trompojn, partianiĝi, iniciati diskutojn, formi la mondon kaj malhelpi ĝin endormiĝi..." Kelkajn tiajn ni bezonas.

La Satanaj Versoj de la titolo estas kelkaj versoj, kiujn Mahometo unue kredis de Dio, poste de Satano, do forstrekis, pri modifita akcepto de tri paganaj diinoj; pri tio Rushdie prezentas la Profeton simpatie, antaŭ problemo, kiun multaj religioj alfrontis: ĝis kioma grado oni faru kompromison kun la antaŭa religio? (La kristanaj kristnasko kaj pasko enprenis plurajn paganajn kutimojn: la sankta ŝtono de islamanoj, en la Kaabo, estis sankta longe antaŭ Mahometo). Ĉu ofende? La prezentado de tekstoj kiel ne rekte diritaj de Alaho, sed diversmaniere elpensitaj kaj sugestitaj, ofendis multajn, sed por multaj aliaj temas pri io normala, eĉ estiminda. (Mi pensas pri famaj vortoj en *Sankta Jobana* de G. B. Shaw, unua akto:

*Jobana:* Mi aŭdas voĉojn, kiuj instrucas min. Ili venas de Dio.

*Robert:* Ili venas el via imago.

*Jobana:* Kompreneble. Estas tiel, ke la mesaĝo de Dio atingas nin.)

Multaj britaj islamanoj sentis diskrimancion, ĉar britaj instancoj rifuzis procesi kontraŭ Rushdie pri blasfemado, ĉar tiu, kiel krimo, nun ege malofta akuzo, temas pri kristanismo, eble nur la anglikana (ŝtata) eklezio. Oni petis, ke la

leĝo etendiĝu por kovri aliajn religiojn. Tio ŝajnas nur justa, sed kreus grandajn dilemojn; iasence, la Korano "blasfemas" por kristanoj (Kristo ne estis filo de Dio) dum la Nova Testamento "blasfemas" por islamanoj (Jesuo estis Filo de Dio); kaj povus estiĝi situacio, en kiu oni ne rajtus kritiki eĉ la plej groteskajn aŭ ĉarlatanajn sektetojn aŭ starigi ĝentilan, racion inter-religian diskuton. La tiama ĉefepiskopo anglikana, d-ro Robert Runcie, mem proponis nuligon de ĉiu leĝo pri blasfemado, kaj novan leĝon, kiu punus nur instigojn al inter-religia malamo.

Rushdie mem esprimis bedaŭron, ke li vundis religiajn sentojn. En ŝlosila artikolo en *The Independent* (ĵurnalo), februaro 1990, li diris, "Mi ne estas islamano" - do ne apostatis -; la libro estas "mondrigardo de migranto". "Ĝi estis verkita el la travivado de elradiĝo, disiĝo kaj metamorfozo... kiu estas la stato de migranto, kaj de kio, miaopinie, ni povas krei metaforon por la tuta homaro...", ĝi "...festas hibridecon, nepurecon, intermiksadon, la transformiĝon, kiu rezultas de novaj kaj neatenditaj kombinoj de homoj, kulturoj, ideoj, politikoj, filmoj, kantoj. Ĝi ĝojas pri rasmiksado kaj timas la absolutismon de la pura. Multingredienceco, mikspoteco, iomete da ĉi tio, iomete da tio alia - tiei io nova eniras la mondon".

Sed, post longaj suferoj, kaj longaj diskutoj kun islamaj fakuloj, Rushdie en decembro 1990 deklaris sin nun islamano, konvertito; dirante, ke li komprenas Islamon kiel "kulturon de toleremo, kompatado, pardono kaj amo", kaj esperante, ke Okcidentanoj akceptos pli kompleksan komprenon pri Islamo kaj forigos stereotipojn; li deziras kontribui al pli simpatia interkompreno inter diversaj kulturoj.



---

**La libro "...festas hibridecon, nepurecon, intermiksadon, la transformiĝon, kiu rezultas de novaj kaj neatenditaj kombinoj de homoj, kulturoj, ideoj, politikoj, filmoj, kantoj. Ĝi ĝojas pri rasmiksado kaj timas la absolutismon de la pura. Multingredienceco, mikspoteco, iomete da ĉi tio, iometo da tio alia - tiel io nova eniras la mondon".**

---

roj. Portempe, li ne permesos malmultekostan eldonon de la libro, aŭ novajn tradukojn. Tio signifos vastan monoperdon por la aŭtoro, kiu jam pagis 100 000 pundojn kontribue al la kosto de sia protektado. La islamaj fakuloj ankaŭ akceptis, ke la libro ne estis intenca insulto.

*La Satanaj Versoj* kolerigis ankaŭ kelkajn reakciemajn britojn per siaj bildoj pri negativaj aspektoj de Britio sub konservativa registaro, rasismo kaj diskriminacio; sed oni prezentis falsan bildon de tio, kion Rushdie skribis; ekzemple, akuzis lin pri komparoj al nazia Germanio, kiujn li neniam faris. Eble li eraris, uzante iom ofte por realismaj dialogoj krudaj - anglian vorton, ekvivalenton al esperanta "fiki" sed pli emocie ŝarĝita en multaj anglaj rondoj; tiel ke iu, rapide trafoliumante la libron, kredis ĝin multe pli obscena, ol ĝi estas.

Sur p. 406 oni trovos ofendan aludon al Esperanto! kiam li mencias "La Esperanto-simila vakueco de granda parto de moderna arto," do por li Esperanto estas "vakueca". Sed mi *ne* atendas, ke Waringhien, muezine el sia alta turo en Parizo, eĉ ne Golden, proklamos mortkondamnon kaj alvokos bonajn zamenhofanojn elingigi siajn ponardojn! Certe *ni* pardonos lin; kaj esperantistoj, precipe sennaciistoj, certe trovos multajn liajn konceptojn kaj aspirerojn tre simpatiaj.

### Infanlibro

En 1990 aperis nova libro, miaopinie perlo: *Harun kaj la Fabeloceano*, eta 211-paĝa romano ĝuinda por geknaboj, sed en kiu adoltoj sublegos multajn aludojn al la animo de homo, kiu tiel multe suferis pro fanatikuloj kaj filistroj. Sed malgraŭ la cirkonstancoj, en kiuj li verkis ĝin (kaj kortuŝe dediĉis al la filo, kiun pro sia nenormala vivostilo li ne povas vidi), la libro estas plena de humuro, vortludoj, sprito, amuzaj epizodoj kaj lia kutima riĉa fantazio, varia kaj mult-tavola. Ĉampiona rakontisto perdas sian edzinon delogitan de fikcio-malamanto, kaj sian rakont-kapablon, kiu fontas el la Fabeloceano; lia filo Harun, kiu parte kulpas per impulsa "Kiel utilas rakontoj eĉ ne veraj?" akompanas la patron dum kelkaj aventuroj, poste ekiras sola (sur la dorso de robota upupo) por helpi lin, kaj implikiĝas en aliaj serĉoj kaj bataloj, por savi principon kaj venki silentigan tiranon, kiu venenas la Fabeloceanon. Ĉio finiĝas bone, per magio, saĝo kaj kuraĝo; patro povas rakonti, patrino revenas. Mallumo kaj opresa silento pereas. Ĉarma fabelo, inĝenia, surprizoplena, imagoriĉa, kun amaso da elpensitaj detaloj; ĝi estas ankaŭ alegorio, pledo por parol-libereco, toleremo, interkomprenemo, kaj pri la tavolo de fikcio kaj artistoj. Estas granda momento, kiam Harun demandas la "Kultmastron", la malheroon, "Sed kial vi tiel malamas fabelojn?"

Fabeloj estas amuzaj..." kaj la Kultmastro respondas:

"Tamen, la mondo ne estas por Amuzo. La mondo estas por Regado." La Kultmastro malamas fabelojn, ĉar en ĉiu fabelo ekzistas mondo, kiun li ne povas regi.

Nun ni scias.

Kaj en krizo, dum konflikto inter la Gupoj (tre parolemaj kaj liberaj) kaj la Ĉupŭaloj, (silentaj, opresitaj, venenantoj de la Oceano), Harun ekkomprenas tamen, "ke silento havas sian propran gracion kaj belon, same kiel parolo povas esti sengracia kaj aĉa; kaj ke Agado povas esti nobla kiel Vortoj, kaj kreitaĵoj de tenebro belaj kiel infanoj de lumo. Se Gupoj kaj la Ĉupŭaloj ne tiel malamus unuj la aliajn, ili fakte povus trovi unuj la aliajn sufiĉe interesaj."

Jen, por geknaboj, pensiga penso de tiu multkultura plureculo, kiu prezentis la mirindan miksitecon de la mondo kaj homaro, kaj malplaĉis al fermitaj mensoj.

---

El Sennacieca Revuo n-ro 119, 1991

"Sennacieca Revuo" estas jara almanako de Sennacieca Asocio Tutmonda. La kvalito de ĝia enhavo sendube igas ĝin unu el la plej interesaj kaj rekomendendaj periodaĵoj en esperanto

Per tiu ĉi artikolo, ni celas kontribui al la ĉi-jara temo de nia kataluna esperanto-kongreso: "De kompreniĝo al toleremo; de kultura diverseco al miksado".



**Gramatika ABC mempraktikilo**

Nur je unua rapida trafolumado oni jam povas konstati, ke temas pri densa praktikilo, tamen belaspekta kaj interese. Poste, frapas tuj la sobra "nelegenda antaŭparolo" kaj sekve la didaktikaj pravigoj kaj konsiloj; krome la orientiga kaj struktura indeksoj konstatis nin, ke la originala metodo, kiun ni havas enmane, estis fake ellaborita surbaze de spertoj en pedagogia prilaborado. Tial adekvataj ilustraĵoj akompanas la lecionojn kaj oftas la uzado de la Zamenhofa proverbaro.

La rezulto estas do tre taŭga metodo por aŭtodidaktaj gelerantoj, sed same profitebla por okazaj esperanto-instruistoj kaj kurs-gvidantoj. Precipe mi konsideras ĝin utila por esperantaj grupetoj en kluboj aŭ societoj, kiuj vere deziras plibonigi la praktikan uzadon de la lingvo kaj ne disponas de adekvata instruisto. Oni nur bezonas la decidon malfermi la libron, serĉi la preferatan gramatikan temon kaj tie elekti inter la tri prezentitaj niveloj. Grupe oni povas praktiki laŭ proponitaj dialogoj kaj eĉ kontroli la kapablecojn. Alloga prezento helpas rapidan pliboniĝon sen enuo.

Ĉar oni konstatas, ke estas antaŭvidita en 1994 la eldono de la verko *ABC gramatiko*, kredeble ĝi rilatos al *ABC mempraktikilo*, kiun ĝi iel kompletigos aŭ pliampleksigos. Tial ni scivolas analizi

iliajn interrilatojn kaj kiel pli profiti la nunan libron.

*Lluís Armadans i Marfà*

- De Vleminck, Christiane; Van Damme, Emile: *Gramatika ABC Mempraktikilo*, Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1993.

**Tiel facila kiel ABC...**

Tion diras anglalingvanoj, kiam iu afero enhavas nenian malfacilaĵon; kaj tiu estas la deklarita intenco de Christiane de Vleminck kaj Emile van Damme kiam post sia ekzercaro *Gramatika ABC-mempraktikilo* ili lanĉis la libron *ABC-gramatiko de Esperanto*: prezenti al la esperanta publiko simplan, klaran kaj praktikan gramatikon.

Kaj ili tute sukcesis. La alfabeto ordo de la pli ol cent temoj, la kompleta indekso, la dukolumna prezento (dekstre, klarigoj; maldekstre, pluraj kaj trafikaj ekzemploj), la evitado de tro teknikaj gramatikaj terminoj... ĉio faras el tiu ĉi libro valoregan helpilon, havendan mezan ŝtupon inter bazaj gramatikoj por komencantoj kaj majstraj verkegoj kiel *Plena Analiza Gramatiko*, tiom malfacile digesteblaj; kaj krome, ĝi helpas ne timigi la eblan leganton.

Pri la enhavo, tamen, ne ĉio iras glate. La decido verki "normigan" gramatikon, kondamnante aŭ rekomendante kelkajn lingvou-

zojn, iam-tiam kreas malkonsenton inter la aŭtoroj kaj la legantoj kun propaj opinioj (preskaŭ ĉiu el ili). Ekzemplo estas la uzo de l' infinitivo kiel imperativo (*Ne fumi!*), aŭ neologismoj, kiujn la aŭtoroj neniam pritraktas, sed ja senaverte inkludas (prepozicio *cis*). Kaj, kial dediĉi tutan paĝon (kaj la libro estas grandformata!) al la afero *ata/ita*, kaj nur linion por kondamni konstruojn kiel *ŝi belas?*

Krom tio, la bedaŭrinde jam kutima stoko da preseraroj iomete ĝenas la legadon de verko en kiu, pro ĝia karaktero, precizeco estas fundamenta. En kelkaj kazoj ĝi povas eĉ konfuzi la legantojn: "*ĉiu prepozicioj*" (p. 16), "*per de*" (p. 21), "*subpropozicio*" (p. 42), "*prepozicio*" (p. 48)...

Sed sufiĉas kritikoj! Plej gravas la fakto, ke per tiu ĉi verko ni havas bonegan kaj tute novtipan gramatikon, kiu senĝene klarigas preskaŭ ĉiun dubon, kiun normala esperantisto renkontas en la uzado de nia lingvo; kaj krome aldonas ampleksan bibliografion, kiu povas utili al li aŭ ŝi por pliprofundigi en specifaj temoj.

De Vleminck kaj van Damme ja meritas niajn rekonon kaj dankon pro libro vere rekomendinda.

B. T.

- De Vleminck, Christiane; Van Damme, Emile, *ABC-gramatiko de Esperanto*, Flandra-Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1994, 240 p.

# La Setmana

SETMANARI OCCITÀ D'INFORMACIONS

VISTEDIT-La Setmana - B.P. 86 - F64230 LESCAR - Occitània - Tel. (+33) 59 68 66 79 - Fax (+33) 59 68 67 17  
Joan-Ferriol Masip i Bonet - Carrer de la Font Florida, 86 tr.ta. - 08004 BARCELONA - Tel. i Fax (93) 332 45 25



## Premi Nobel a un esperantista

□ ELNA UPDATE

El professor Reinhard Selten va rebre el darrer premi Nobel d'economia pel seu treball sobre la teoria dels jocs aplicada a models del món real. Selten és Membre Vitalici de l'Associació Universal d'Esperanto i de diverses altres organitzacions esperantistes. A més de les seves investigacions guardonades amb el Nobel, Selten ha col·laborat també en un llibre sobre la teoria dels jocs "Ĉu mi lernu esperanton?" Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj" (Cal que aprengui esperanto? Introducció a la teoria dels jocs lingüístics). Des de l'anunci del premi Nobel, el llibre ha desaparegut de les llibreries. Tres altres esperantistes han guanyat premis Nobel, un de química, un de física i un de la pau. Sis altres premis Nobel han donat formalment suport a l'esperanto.

## L'objecció de consciència catalana en esperanto

La revista juvenil en esperanto *Kontakto*, editada a Holanda, va publicar en el número d'octubre una extensa sèrie d'entrevistes a objectors de consciència i insubmissos catalans feta per dos membres de la Joventut Catalana d'Esperanto. Aquesta associació no té cap membre que hagi fet el servei militar complet, la qual cosa denota un impressionant nivell d'antimilitarisme en una entitat que en principi no està directament relacionada amb el moviment pacifista.

## Guatemala accepta els drets dels seus pobles indígenes

□ EL PAÍS

Representants del govern de Guatemala i de la Unió Revolucionària Nacional Guatemalena van acordar modificar la constitució d'aquest estat centramericà per incloure-hi els drets dels pobles nadius. Fins ara la màxima llei ignorava el 60% dels 10 milions d'habitants del país.

L'Acord sobre Identitat i Drets Indígenes, subscrit el proppassat 31 de març, és el fruit de cinc mesos d'estira i arronsa entre les dues parts. La nova constitució definirà Guatemala com "una nació multiètnica, pluricultural i multilingüe", la qual cosa significa que les principals llengües natives compartiran amb l'espanyol la categoria de llengua oficial. A més, es reconeixeran jurídicament les formes d'organització de les diferents comunitats, amb les seves autoritats i normes consuetudinàries, el dret a la propietat col·lectiva o individual de la terra i el dret dels infants a rebre l'educació en la seva llengua. Les autoritats s'han compromès també a tipificar la discriminació ètnica com a delictes.

El perill, però, per a aquests acords és l'extrema dreta colpista, que ja s'hi ha oposat.

## L'oficialitat de l'anglès inconstitucional

□ ELNA UPDATE/ASSOCIATED PRESS

La llei "Anglès oficial" de l'estat d'Arizona ha estat declarada inconstitucional per la novena sala federal d'apel·lacions que ha declara-

rat que "la llibertat d'expressió inclou l'elecció de la llengua". Segons el tribunal, els estats poden encoratjar l'ús d'una llengua comuna, però sense il·legalitzar altres idiomes. La reforma constitucional d'Arizona que obliga els governs de l'estat i locals a utilitzar exclusivament l'anglès restringeix la capacitat dels ciutadans no-angloparlants de comunicar-se amb el seu govern, segons diu la sentència.

## Enciclopèdia del llenguatge

Ha aparegut l'edició castellana de l'excel·lent *The Cambridge encyclopedia of language* (Crystal, David, *Enciclopedia del llenguatge de la Universidad de Cambridge*, Taurus, Madrid, 1994). Es tracta d'una obra extensa (475 pàgines de format gran), on es recullen tots els aspectes de la lingüística: des de l'estructura del llenguatge fins als trastorns de la parla i des de l'adquisició infantil del llenguatge fins a la fisiologia de la parla. El contingut és sempre rigorós i entenedor. La versió castellana, dirigida pel professor Moreno Cabrera, no desmereix en absolut l'original, ja que s'ha fet un formidable treball d'adaptació: desenes de fotos i requadres relatius al castellà enlloc dels referents anglesos de l'original (hem només de remarcar que no es fa cap esment particular a les llengües cooficials de l'estat: per exemple a l'apartat de normativització es parla de la Real Academia de la Lengua i d'Antonio de Nebrija, sense fer cap referència a l'Institut d'Estudis Catalans o a Pompeu Fabra).

L'obra conté un capítol de cinc planes dedicat a les "llengües artificials" (el ter-

me, com es diu, és rebutjat pels esperantistes, que prefereixen el concepte de "llengües planificades"). Es tracta d'una bona introducció al tema, del tot aconsellable, encara que amb dades ja una mica massa antiquades, un dels pocs problemes de l'obra. La versió espanyola inclou un article sobre el *neoispano*, llengua creada a partir de l'espanyol. Malauradament a la bibliografia no s'hi ha inclòs cap obra de consulta en castellà.

## Apreneu klingon en esperanto

Acaben d'aparèixer en esperanto les dues primeres lliçons del curs de *klingon*, la llengua inventada per a la pel·lícula *Star Trek* que ha fet furor entre els seguidors americans de la sèrie. Alhora s'ha publicat, també en esperanto, *Konciza gramatiko de Volapuko*. *Gramatiko de Volapuko* (gramàtica concisa de volapuk). El volapuk va ser la primera llengua planificada que va assolir un gran èxit a la dècada del 1880 quan, segons sembla, es van vendre més d'un milió d'exemplars de gramàtiques en aquest idioma. La seva gran complexitat va fer que ràpidament es demanessin reformes en la llengua, la qual cosa va provocar una fulminant desaparició del moviment volapukista.

Actualment, si bé existeixen publicacions en una dotzena de llengües planificades, més del 99% d'elles són esperantistes. També es calcula que més de la meitat dels parlants de llengües planificades que no són l'esperanto són esperantistes amb curiositat lingüística, com ho demostren aquestes dues noves obres, fetes per coneguts autors en esperanto.